

VORTOJ

Esperantigo : Rovere Emanuele

muziko: Singleton C./Cavanaugh J. – teksto: Bertini U.

Vortoj banalaj estas tre oftaj : evitas mi ilin kaj ankaŭ vi.

Do, kiam mi diris “ Kara, mi amas vin “,

profundan signifon enmetis mi.

Stultajn vortojn mi neniam uzis,

ekde nia plej frua renkontiĝo,

ĉar pli bonas vortoj seriozaj,

kiuj venas senpere el mia kor’.

Kiam mi prenos vian manon por ĉiam,

ĝoje kantos ĉiuj sonoriloj de l’ mondo

kaj ni diros “ Jes, mi volas “ : eternan amon sigelos ni.